

# Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 204 (2017:4)

Okt – Dec 2017



Du Libroj

Jen estis inventita  
la kandombleo

La uzado de la  
sufikso -ig

# Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 204 (2017:4)

Okt - Dec 2017

76-a jarkolekto

Redaktas: Fernando Pita

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Fernando Pita, Allan Argolo,  
Josenilton kaj Madragoa,  
Paŭlo Sergio Viana kaj Dirce Sales

Kovrilo:


Foto de nekonata aŭtoro.



Associação Esperantista do Rio de Janeiro


Rua Teófilo Otoni, 135 / 302  
telefone: 2467-4296

 [disvastigo.aerj@gmail.com](mailto:disvastigo.aerj@gmail.com)

 [www.aerj.org.br](http://www.aerj.org.br)

 [facebook.com/aerj.esperanto](https://facebook.com/aerj.esperanto)


 [youtube.com/user/TVaerj](https://youtube.com/user/TVaerj)



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro - dezembro / 2010



RIO



ESPERANTISTA

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO Nº 18 JANUARO - MARTO 1997



Enhavo

- El la Redakcio \_\_\_\_\_ 3
- Jen estis inventita la kandombleo \_\_\_\_\_ 5
- Virinoj estas pli inteligentaj... \_\_\_\_\_ 9
- Du libroj:
  - Esperanto preter la lingvo \_\_\_\_\_ 10
  - Grava historia verko reeldonita \_\_\_\_\_ 13
  - Gramatiko: Uzado de la sufikso -ig \_\_\_\_\_ 15
- Raporto:
  - Rakonto de e-istoj en la Paraíba Valo \_\_\_\_\_ 17
  - Z-festo en Municipia Ĉambro \_\_\_\_\_ 18

## Ĝis iam, ie!

Karegaj amikoj,

Jen denove je viaj manoj nova ekzemplero de *Rio Esperantista*! Post iom da tempo kaj nepardonenda – kvankam klarigebla – malfruo, ni, estraro de AERĴ, alportas por vi novan numeron de nia trimonata revueto. Ĉi-foje kun kelkaj novaĵoj kaj komentoj kiuj, ni esperas, alportos por vi ne nur momentojn de ĝuo, sed ankaŭ freŝajn informojn pri la agado de via asocio.

Dum la lastaj monatoj, multaj aferoj okazis ĉe ni: En septembro, AERĴ organizis kaj partoprenis je diversaj eventoj kaj okazintaĵoj rilataj al nia esperanta movado: duafoje ni organizis kaj starigis budon ĉe la “Internacia Libro-Bienalo de Rio-de-Janeiro”, kie ni, dum 10 tagoj, prezentis Esperanton al la pli ol 500 mil personoj kiuj vizitis la eventon. Tamen, kvankam *Bienalo* ĉiu foje pli solidiĝas kiel la plej elstara evento organizata de AERĴ, nia asocia vivo ne limiĝas al tio: en novembro AERĴ organizis la Renkontiĝo de la Paraíba-Valo, ĉi-foje en la urbo Volta Redonda.

Sed ne nur pri eventoj temos tiun eldonon de *RE*: dum la lastaj monatoj estis lanĉita de AERĴ novan libron, la portugallingvan “*O Esperanto além da língua*”, kies aŭtoro estas via redakciestro kaj nia kara kunlaboranto Guilherme Fians. Pri tiu verko vi



povos legi en la venontaj paĝoj. Ankoraŭ pri libroj, denove AERĴ ricevis grandan helpon de unu el iuj movadaj modestuloj, nia kara amiko Fabrício Possebon eldonis kaj rajtigis al AERĴ vendi, dum Bienalo, lian reeldonon de l' unua kanto de “*Eneido*”, la granda majstroverko de la latina literaturo, tradukita de la franca pioniro Henri Vallienne kaj unuafoje eldonita en 1905.

Ĉi-numere oni inaŭguras novan sesion de nia revuo: la gramatika angulo, en kiu vi ĉiam trovos komentariojn kaj konsilojn por pli bone uzi nian kara lingvon. Hodiaŭ nia kara d-ro Paŭlo Sérgio Viana klarigas al ni ion pri la sufikso -ig-. Oni ankoraŭ havas belan tekston de Reginaldo Prandi, sociologo kaj esploristo, kiu rakontas la ekaperon de Kandobleo. Tiu teksto estas majstra traduko de nia kara samideano, la ĉefa motoro de *Rio Esperantista*, Allan Argolo. Alia kontribuado estis farita de

niaj amikoj Josenilton kaj Madragoa (kies identeco estas unu el la plej profundaj sekretoj de Esperantujo), tiu teksto temas pri la rilato inter seksegaleco kaj inteligenteco de virinoj. Tre indas legi ĝin!

Mi komencis tiun tekston dirante ke la malfruo de nia revuo estas nepardonebla; tamen, ĝi havas kialon, tute klarigenda: tiuj, kiuj konas min, scias, ke mi estas profesoro en UERJ – do mi estas ŝtata funkciulo – kaj, danke al la “krizo” en ŝtato de Rio-de-Ĵanejro (krizo kiu ne tuŝas la riĉulojn, kompreneble) mi suferas konstantan 4-monatan malfruon en mia salajro, kiu devigas min preni aliajn farenaĵojn, por almenaŭ garantii la ĉiutagan panon – ĉar ĉio alia jam forblovis -, tiel, ne al mi restas tiom da tempo por dediĉi al Esperanto kiel antaŭe, kaj mi devis elekti inter miaj taskoj, kiuj estis

transpreneblaj de aliuloj. Tiel, iom dolorige mi decidis ne plu prizorgi *Rion Esperantistan*; ĉar mi kredas ke diversaj aliaj homoj povas, pli bone kaj akurate ol mi, preni tiun taskon. Tiu estas do la lasta eldono de *RE* kie vi trovos mian nomon kiel redaktanto. Mi devas diri ke, eldoni *RE*-n estis granda defio, kiun mi provis plenumi je la mezuro de miaj fortoj kaj ne ĉiam kontentigaj kapabloj, sed ĉiam kun sindediĉo al nia kara asocio kaj al Esperanto. Kompreneble, tamen, mi daŭre kunlaboros kun la revuo - vi ne tiel facile liberiĝos el mi! – do, amikoj, mi ne adiaŭos, sed simple diros al vi: ĝis iam, ie!

Gajan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj!

Fernando Pita



## Jen estis inventita la kandombleo'

Reginaldo Prandi  
Esperantigis: Allan Argolo

En la komenco ne estis apartaj  
*Orun'*, la Ĉielo de oriŝaoj<sup>2</sup>,  
kaj *Aije'*, la Tero de homoj.  
Homoj kaj diaĵoj iradis kaj venadis,  
kunloĝis kaj kundividis vivojn kaj aventurojn.  
Oni rakontas, ke kiam *Orun'* estis lime al *Aije'*,  
unu homo tuŝis *Orunon* per malpuraj manoj.  
La senmakula ĉielo de la *Oriŝa'* estis malpurigita  
La senmakula blanko de *Obatala'*<sup>3</sup> perdiĝis.  
*Oŝala'*<sup>4</sup> plendis al *Olorun'*<sup>5</sup>.  
*Olorun'*, Sinjoro de l' Ĉielo, Supera Dio,  
koleriĝinta pro la malpureco, malŝparemo kaj malzorgemo de mortaloj,  
furioze blovis sian dian blovaĵon  
kaj apartigis por ĉiam la Ĉielon de la Tero.  
Tiel, *Orun'* apartiĝis de la homa mondo  
kaj neniu homo povus iri al *Orun'* kaj de tie reveni viva.



*Oŝala'* iras al *Olodumare'*  
Sceno de la animacia filmeto *Orun Aiyé - a criação do mundo*.

## *Kovrilo*

Kaj ankaŭ la oriŝaoj ne povus veni al Tero per siaj korpoj.  
Nun estis la mondo de homoj kaj tiu de oriŝaoj, apartaj.  
Izolitaj de la homoj loĝantoj de *Aije'*,  
la diaĵoj tristiĝis.

La oriŝaoj sopiris siajn peripetiojn inter la homoj  
kaj vagadis tristaj kaj malgajaj.

Ili plendis al *Olodumare'*<sup>6</sup>, kiu fine konsentis,  
ke la oriŝaoj povu fojfoje reveni al Tero.

Por tio, tamen,

ili bezonus transpreni la materian korpon de siaj devotuloj.

Tiu estis la kondiĉo postulata de *Olodumare'*.

*Oŝun'*<sup>7</sup>, kiu antaŭe ŝatis veni al Tero por ludi kun virinoj,  
kaj kundividis kun ili sian lindecon kaj vantecon,  
kaj instruis al ili sorĉojn por admirinda allogo kaj nerezistebla ravo,  
tiu ricevis de *Olorun'* novan taskon:

prepari la mortalojn por ricevi oriŝaajn en siajn korpojn.

*Oŝun'* plenumis oferadojn al *Eŝu'*<sup>8</sup> por oportunigi sian delikatan mision.

De ŝia sukceso dependis la ĝojo de ŝiaj gefratoj kaj amikoj oriŝaoj.

Ŝi venis al *Aije'* kaj kunigis la virinojn ĉikaŭ si,

lavis iliajn korpojn per valoraj herboj,

tondis iliajn hararojn, razis iliajn kapojn,

farbis iliajn korpojn.

Ŝi farbis sur iliaj kapoj blankajn makuletojn,

per la plumoj de l' kaskonumido<sup>9</sup>.

Vestis ilin per belegaj tukoj kaj abundaj bantoj,

ornamis ilin per juveloj kaj kronoj.

La *ori'on*, la kapon, ŝi ornamis per la plumo *ekodide'*,

ruĝa plumo, rara kaj mistera, el la griza papago.  
 Ŝi enmanigis al ili ventumilojn, glavojn, sceprojn,  
 ĉirkaŭ manradikoj, jen dekduoj da oraj braceletoj.  
 La bruston ŝi kovris per volvoj kaj volvoj da multkoloraj bidoj  
 kaj pluraj vicoj de bukcenetoj, ceramikoj kaj koraloj.  
 Sur la kapon ŝi metis konuson el butero de *ori'*,  
 delikatajn herbojn kaj maĉitan *obi'on*,  
 kun ĉia spicaĵo ŝatata de l' oriŝaĵoj.  
 Tiu konuso altirus la oriŝaon al la kapo de la neofitino kaj  
 la oriŝaon neniel trompiĝus pri sia reveno al *Aije'*.  
 Fine, la etaj edzinoj estis preparitaj,  
 estis pretaj, kaj estis *odara*<sup>10</sup>.  
 La *ijao'oj*<sup>11</sup> estis la plej belaj edzinoj  
 kiujn la vanteco de *Oŝun'* povus koncepti.  
 Ili estis pretaj por la dioj.  
  
 Jen la oriŝaĵoj havis siajn ĉevalojn,  
 povis sekure reveni al *Aije'*,  
 povis rajdi la korpon de la devotulinoj.  
 La homoj oferadis al la oriŝaĵoj,  
 invitante tiujn al Tero, al la korpoj de la *ijao'oj*.  
 Sekve la oriŝaĵoj venadis kaj prenadis siajn ĉevalojn.  
 Kaj dum la homoj tamburadis,  
 vibrigis *bataojn* kaj *agoojajn*, sonorigis *ŝekereojn* kaj *aĝaojn*<sup>12</sup>,  
 dum la homoj kantadis kaj ovaciadis kaj aplaudadis,  
 invitante ĉiujn devotulojn al la rondo de *ŝire'*<sup>13</sup>,  
 la oriŝaĵoj dancadis kaj dancadis kaj dancadis.  
 La oriŝaĵoj povis denove kunvivadi kun mortaloj.

## Kovrilo

La oriŝaĵoj estis feliĉaj  
En la rondo de preparitaj inoj, en la korpo de *ijao*'oj,  
ili dancadis kaj dancadis kaj dancadis.  
Estis inventita la kandombleo.

(El *Mitologia dos Orixás*, p. 524-528)



Inicia ritualo de kandombleo.  
Foto: Vanessa Arruda ([bit.ly/ElasdeAxe](http://bit.ly/ElasdeAxe))

<sup>1</sup> **Kandombleo**: afrikdevena religio, ofte praktikata en Brazilo.

<sup>2</sup> **Oriŝao** [*Òriŝà*]: dio de la joruba tradicio.

<sup>3</sup> **Obatala'** [*Obátàlá*]: laŭlitere “reĝo de la blanka tuko”; oriŝao de la kreado; konsiderita la ĉefa oriŝao.

<sup>4</sup> **Oŝala'** [*Ọ̀riṣànlá*]: laŭlitere “granda oriŝao”; Obatala'.

<sup>5</sup> **Olorun'** [*Ọ̀lorun*]: laŭlitere “mastro de l' ĉielo”; Olodumare'.

<sup>6</sup> **Olodumare'** [*Olódùmaré*]: supera dio, kreinto de la oriŝaĵoj.

<sup>7</sup> **Oŝun'** [*Ọ̀ṣun*]: oriŝao de la rivero *Ọṣun*, diino de dolĉaj akvoj, de l' oro, beleco kaj vanteco.

<sup>8</sup> **Eŝu** [*Èṣù*]: oriŝao mesaĝisto; reganto de vojkruciĝoj kaj gardanto de pordejoj; la unua kiu estas omaĝita en ritualoj.

<sup>9</sup> **Kaskonumido**: birdspecio (*Numida meleagris*) originala de sudsahara afriko.

<sup>10</sup> **Odara** [*ó dára*]: bona, bela.

<sup>11</sup> **Ijao'** [*ìyawó*]: juna edzino; neofito (viro aŭ virino) kiu spertas trancon de oriŝaĵoj.

<sup>12</sup> **Batao, agogoo, ŝekereo, aĝao**: tradiciaj frapinstrumentoj.

<sup>13</sup> **Ŝire'** [*ṣiré*]: ludi; en kandomblea ritualo, kantado kaj dancado en rondo adore al oriŝaĵoj.



## Virinoj estas pli inteligentaj en landoj kun seksa egaleco

Josenilton kaj Madragoa

Esploro de la Universitato Paris-Dauphiné, en Francujo, sugestas, ke la intelekto de la virinoj estas rekte rilata al la garantio de egalaj rajtoj inter la seksoj en ĉiu lando.

Publikigite en *Psychological Science*, la studaĵo montras, ke kiom pli da seksegaleco, tiom pli da ŝancoj al la mezaĝaj virinoj havi pli da kono, ol la viroj. Krom tio, esploristoj alvenis al tiu ĉi interesa konkludo: en kelkaj nacioj la virinoj superis la virojn.

La sciencistoj konstatis, ke en la nacioj pli konservativaj la virinoj estas tiuj, kiuj havas malpli da scioj. Tio, ĉar la alirado al la studo fare de ili estas restrikta, kaj ĝenerale ili estas edukataj por zorgi nur pri la domo kaj la familio. Svisujo, por ekzemplo, estas la lando, kiu plej multe havas virinojn kun pli bonaj

konaj lertecoj. Siavice, en Ganao la viroj superas multe la virinojn. Por alveni al tiuj rezultoj, la esploristoj faris teston pri inteligenteco ĉe virinoj kaj viroj havantaj inter 50 kaj 93 jarojn. La partoprenintoj estas el 27 malsamaj nacioj.

La plimulto el la testeroj estis pri memoro, kiel ekzemple ripeti vortojn ĵus montritajn kaj kaŝitajn. La testitoj devis ankaŭ respondi, ĉu ili konsentas (aŭ ne), ke la lokoj, kie ili loĝas, havigas samajn rajtojn al viroj kaj virinoj.

“La intelekto ne povas esti tute komprenita sen la scio pri la oportunoj de disvolviĝo, kiujn la socioj ebligas (aŭ ne)”, konkludas la studaĵo.

El la blogo:

<http://jotakaeme.blogspot.com.br>



## Esperanto preter la lingvo

Fernando Pita

*Audaces Fortuna iuuat* kutime diradis Virgilio, la romia poeto. Kaj jes, “Sorto helpas la aŭdacajn (ulojn)”, kaj mi devas aldone konfesi: ĉar mi kredas min aŭdaca homo, mi povas same diri ke la diino *Sorto* ne nur helpas sed iel protektas min. Mi tion diras ne pro vantemo, tamen ĉar prezento de tiu verko elmontras kiamaniere la sorto kontribuis pro tio, ke ĝi estis nun eldonita.

Antaŭlonge mi konstatis, ke mankas al esperantistoj aliro al sia propra kulturo. Tio tute ne okazas pro mal-intereso, sed pro tio ke ĝenerale homoj ne scias kie komenci ekkoni ĝin. Fontoj ja ekzistas, ili ĉiam estis en niaj kluboj kaj en niaj bibliotekoj, kaj hodiaŭ interreto metas en ĉies manoj facilan aliron al informoj, libroj, vortaroj, revuoj, ktp. Fakte la problemo estas ke oni disponas pri tiom grandaj elektebloj ke oni nenion kapablas plu elekti!


Mankis do ian materialon kiu, kiel

antaŭe rolis verkoj kiel *Esperanto en Perspektivo*, disponigu al iu ajn la mapon de la ĉefaj vojoj ene de Esperantujo. Tamen, tiu verko ne

povus havi, kiel sia menciita antaŭulo, preskaŭ 1000 paĝojn! Tute ne! Homoj ne plu havas tempon digesti tiom da informoj! Ĝi devus esti simpla enkonduka manlibro pri esperanta kulturo, io pli simila al verkoj kiaj *Esperanto – Lingvo, kulturo, movado*, de Pierre Janton; aŭ “*O que é o Esperanto?*” de nia karmemora Isabel Santiago, kiuj enkondukis la temojn kaj indikis kien leganto

devus iri, kaze ili dezirus, por scii iom pli.

Tamen, dum mi remaçadis tiun ideon, oni ekkomencis pripensi kian estus la Bienalo de 2017. Kaj, en tiu trafa momento, nia samideano Walter Fontes prezentis al Márcio Santos (prezidento de AERĴ) ideon pri farado de “materialo” kiu donus al vizitantoj de nia budo rapidajn




informojn pri nia lingvo kaj pri ĉio kio, iel ajn, povus rilatiĝi al ĝi. La precipa argumento estis, ke la broŝuro “*Descubra o Esperanto*”, estis jam sufiĉe malaktualiĝinta por ĝuste funkcii kiel propagandilo. Bone, Márcio transdonis al la estraro de AERĴ la ideon de Walter, kaj mi ekkomencis cerbumi pri kiamaniere pli trafe plenumi ĝin. Kaj jen la diino manifestiĝis je formo de ideo! Kial ne kunligi ambaŭ ideojn, kaj prepari, anstataŭ broŝuron, la verkon pri kiu mi jam delonge pensadis?

Ĉi-momente, amikino prezentis al mi mian estontan partneron Guilherme Fians, antropologo kiu esploris la esperanto-movadon (hodiaŭ li daŭre tion faras je sia doktoriĝa kurso en la Universitato de Manĉestro, Anglio). Guilherme rapide entuziasmiĝis kun la ideo, kaj ni tuj dividis kiajn partojn de la libro estu verkita de kiu.

Jen la komenca biografio kaj resumo de “*O Esperanto além da língua*”, libro lanĉita de la Esperanta LibroKlubo en la ĵus-okazinta Internacia Bienalo de Libro de Rio-de-Ĵanejro. Tiu verko prezentas, en sia tricento da paĝoj, la plej aktualan bildon de la esperanta mondo. Ĉar la celo estis la ĝenerala publiko, la teksto estas en la portugala. Tiel, ĝi povas atingi legantaron pli larĝan ol

esperantistoj (tiuj eĉ povos donaci aŭ pruntedoni la libron al siaj neesperantistaj amikoj!).



Saĝa homo legante la libron  
*O Esperanto Além da Língua*

La libro estas dividita en kvin ĉapitroj, kiuj temas respektive pri la historio de Esperanto, prezentas rapidajn klarigojn pri la funkciado de nia lingvo, elmontras kaj diskutas la fundamentojn de nia kulturo, parolas pri la ĉeesto de Esperanto en artoj kaj komunikado (literaturo, teatro, muziko, kino, interreta mondo) kaj, finfine, prezentas tiujn kiuj estas, hodiaŭ, la plej aktivaj esperantaj institucioj.

Tamen, prepari tiun verkon, dum la malgranda limdato kiun ni havis postulis al ni ambaŭ ne nur multajn streĉojn je verkado, sed ni ankaŭ devis kundividi fortojn kun gravaj invititoj, kiuj, speciale por nia projekto, bonvole alportis al ni siajn konojn: tiel, Rafael Zerbetto verkis pri kino, muziko kaj interreta mondo. Renato Corsetti, eksprezidento de UEA, verkis pri nia tutmonda asocio; Vinko Markov, prezidento de SAT, skribis pri la asocio de la laboristoj; Perla Martinelli verkis pri la Esperanta Civito; nia kara amiko James Piton verkis bonegan tekston pri Brazila Esperanto-Ligo. Estas ankaŭ teksto de Guilherme Fians pri la fakaj asocioj, kiuj estas tre gravaj ĉe ni.

Nia fina celo estis kompreneble, ke ĉiu leganto povu scii, ĝuste kaj trafefe, la plej aktualajn novaĵojn pri Esperanto, por ke tiu almenaŭ sciu, ke Esperanto ne estas fiaskinta projekto nek nura hobbio, sed lingvo vivanta, kiu havas propran kulturon, proprajn valorojn ktp. Kontraŭbatali tiun falsinformadon kaj prezenti bildon de nia situacio, ne nur al la ĝenerala legantaro sed ankaŭ al esperantistoj mem estis nia precipa celo, kaj ni esperas ke, fine de legado, ĉiuj havu enkapte tiun aktualan kaj ĝustan bildon pri

Esperanto, en ĉiuj tiuj siaj trajtoj kiuj iras *preter la lingvon*.

Do, kara leganto, ne forgesu, ke la disvendado de “*O Esperanto além da língua*” ne estas por mi mem, nek por Guilherme, nek por niaj kunuloj, sed por helpi AERĴ-on je sia laboro disvastigi Esperanton, kaj aĉetu ĝin donace al viaj esperantigotaj geamikoj!



Fernando Pita kaj Guilherme Fians, okaze de la oficiala lanĉo (aŭ ĵeto) de *O Esperanto Além da Língua*.



## Grava historia verko reeldonita!

Fernando Pita

Jaro 19 antaŭ Kristo: mortas en Brindisio la romia poeto Publio Virgilio Maro. Amiko kaj de aliaj tiamaj poetoj kaj de la imperiestro Aŭgusto, li akceptis lian peton verki grandan epopeon kiu kolektus kaj rakontus ĉiajn legendojn rilatajn al sia popolo, tiel la verko funkcius ankaŭ kiel propagandilo de imperia reĝimo.


Tial, Virgilio pasis siajn lastajn jarojn komponante *Eneidon*, la epopeo kiu rememoras kiamaniere Eneo, unu el la plej gravaj trojanoj, sukcesis, post la falo kaj detruo de Trojo far la grekoj, krei en Italio novan urbon, kaj kies pranepoj estus la romianoj. *Eneido* rapide fariĝis la plej grava verko de la latina literaturo, kiu katapultis la famon de Virgilio tra la jarcentoj.

Jaro 1905 post Kristo: vegetante pro sia kormalsano kaj sciante sin baldaŭ mortonta, franca kuracisto

Henri Vallienne febre dediĉas siajn lastajn tagojn al tradukado de la virgilia epopeo al nova lingvo, ĵus inventita de pola kolego. Homoj dubis ĉu tiu nova lingvo estus taŭga por longaj poemoj kaj eĉ por bonaj tradukoj el antikvaj lingvoj, kiel la latina. Tial, d-ro Vallienne pacience kaj detale ellatinigas ĉiujn versojn de la epopeo, kreante la unuan larĝan tradukon de la esperanta literaturo, kaj pruvas per tio ke la nova lingvo taŭgas por ĉiaj beletraj homaj manifestiĝoj.

La unua eldono de *Eneido* far eldonejo Hachette, en 1906, rapide elĉerpiĝas, sed ne sen antaŭ mutigi ĉiujn kontraŭulojn de

Esperanto, kiuj povis havi ĉemane la bonkvalitan, majstran kaj magistran tradukon de la ĵusforpasinta doktoro Vallienne. Tiu *Eneido* eĉ havis duan eldonon, en 1910, kaj tio elmontras kiom da furoro ĝi elvekis: hodiaŭ oni eĉ ne povas imagi duan eldonon de



esperanta libro nur 4 jarojn post la unua eldono!

Sed, jaroj pasis, la verko estis elĉerpita, forgesita, kaj hodiaŭ oni preskaŭ ne plu disponas pri originalaj ekzempleroj de tiuj du eldonoj de la frua 20-a jarcento. Konstatinte tiun problemon, profesoro Fabrício Possebon traserĉas antikvan ekzempleron de la esperanta *Eneido*. Post diversaj fiaskintaj provoj, finfine mikrofilma kopio estis trovita ĉe la Nacia Aŭstra Biblioteko. En tiu ĉi momento, d-ro Possebon invitis min partopreni la projekton, preparante reeldonon de tiu verko. Ĉar ni jam estis kunlaborintaj je preparado de eldono de *Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo*, de Francisco Valdomiro Lorenz, estus tre plezurige denove labori kune kun Fabrício.

Ni devis komplete retajpi la tekston, aldoni notojn, ktp. Fine, la tuta libro estas jam preta por eldono, tamen, pro la ekonomia krizo kaj aliaj kialoj, ni decidis sekvi la paŝojn de d-ro Vallienne, kaj unue eldoni, kiel provo, la unuan kanton de la poemo. Por ke ĉiu povu ĝui la belsonecon kaj similecon inter latino kaj Esperanto, ni preparis dulingvan eldonon de tiu libro, kiu, omaĝe al unu el niaj plej gravaj pioniroj, estis lanĉita de ni dum la Bienalo de Rio, kaj estas je dispono de ĉiuj, en la librejo de AERĴ. Ne maltrafu la okazon ekhavi ĝin!



Henri Vallienne (naskiĝis la 19-an de novembro 1854 en Saumur, mortis la 1-an de decembro 1908 en Malakoff apud Parizo) estis franca kuracisto, esperanta tradukisto kaj la unua aŭtoro de du ampleksaj originalaj romanoj: *Kastelo de Prelongo* kaj *Ĉu li?*

Vallienne estis, laŭ la atesto de Carlo Bourlet “alt-kreska, fortika, larĝsultra viro kun sufiĉe longaj haroj kaj barbo, griznigraj, akrevidantaj okuloj, severa mieno. En tiu korpo de mezepoka kavaliro batis plej sentema kaj bona koro, en tiu kapo de kaperisto loĝis cerbo de altpensema scienculo.”

El Vikipedio

## Pri la uzado de la sufikso –ig

Paŭlo Sergio Viana

1. Kiam oni uzas la sufikson –ig– post adjektivo, ĝi estas tre facila. Ĝi signifas “fari –a”. Ekz.:

bela > beligi (fari bela);

facila > faciligi (fari facila);

granda > grandigi (fari granda).

2. Tamen, la uzado de –igi post **transitivaj** verboj estas pli subtila. Ĝi signifas “fari, ke oni -u”. Ekzemple:

a) “La urbestro konstruigis novan hospitalon.” Tio estas, la urbestro faris, ke oni konstruu la hospitalon. Tamen, estis ja laboristoj kiuj konstruis la hospitalon.

b) “La patrino manĝigas fruktojn al la infano.” Tio estas, la patrino faras, ke la infano manĝu fruktojn. Estas la infano kiu manĝas.

c) “La juĝisto arestigis diversajn politikistojn.” (La juĝisto faris, ke oni arestu la politikistojn. Sed estis la polico kiu arestis ilin.)

ĉ) “La inĝeniero pavimigis la stratojn de la urbo.” (La inĝeniero faris, ke oni pavimu la stratojn. Do

laboristoj pavimis ilin.)

d) “La paŝtisto trinkigis akvon al la ĉevalo.” (La paŝtisto faris, ke la ĉevalo trinku akvon. La ĉevalo trinkis akvon.)

3. Specialan atenton oni devas doni al la verboj **kolori** kaj **kolorigi**.

**Kolori** signifas: doni al io *ĝian* (propran) koloron. Ekz.:

“La herbo koloris la kampon.” Tio signifas, ke la kampo nun estas verda.

“La matena suno koloris la ĉielon.” Do, la ĉielo bluas.

“Bona manĝo koloras la vangon de la infano.”

**Kolorigi** signifas: fari, ke io ricevu koloro(j)n per tinkurado aŭ simile. Ekz.:

“Mi kolorigis mian domon blua.”

“La pentristo kolorigis la vestojn plurkole.”

“La sango de la viktimo kolorigis la pavimon.”

“La aktorino kolorigis sian vizaĝon.”

# Curso de Verão Esperanto

Início:  
11/01/18

Término:  
22/02/18

Horário: 18h às 19h20min

Local:  
R. Abílio dos Santos, 137  
Bento Ribeiro/RJ  
C. E. Léon Denis - CELD

Inscrição:  
Secretaria de Cursos (CELD)

Realização:  
E-G Lázaro Lutz Zamenhof



## KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ - KKE Cooperativa Cultural dos Esperantistas

Av. 13 de Maio, 47 – Sobreloja 108 (208) - Centro - Rio de Janeiro – RJ  
CEP 20031-921 Tel.: 2220-7486 – Tel/Fax: 2544-4314  
[www.kke.org.br](http://www.kke.org.br) / [esperanto.kke@gmail.com](mailto:esperanto.kke@gmail.com)

## CURSO DE ESPERANTO DE VERÃO (JANEIRO E FEVEREIRO/2018)

Início: 08 DE JANEIRO DE 2018

Término: 05 DE MARÇO DE 2018

SEGUNDAS E QUARTAS-FEIRAS

Horário: 9:00h ÀS 10:30h

Instrutor: Givanildo Costa

**INSCRIÇÕES ABERTAS (CURSO GRATUITO)**  
APRENDA ESPERANTO, A LÍNGUA INTERNACIONAL,  
E FALE COM O MUNDO INTEIRO.



## Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba Valo

Paŭlo Sergio Viana

La Paraíba-Valo estas grava regiono en Brazilo, ĉar ĝi situas inter du el la ekonomie plej fortaj landaj ŝtatoj: Rio-de-Ĵaneiro kaj San-Paŭlo. Laŭlonge de la kvarcent kilometroj, kiuj kuŝas inter tiuj du ĉefurboj, troviĝas sinsekvo da mezgrandaj urboj, kaj en multaj el ili ekzistas rondoj de Esperantistoj. Pro tio, jam de du jardekoj, oni okazigas Esperantistajn rekontojn en tiu regiono, por ke lokaj samideanoj amikiĝu kaj praktiku la lingvon. Nuntempe, ili okazas dufoje en ĉiu jaro, jen en unu ŝtato, jen en la alia, alterne.

En la pasinta 12-a de novembro okazis unu plia Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba-Valo, ĉi-foje en la urbo Volta Redonda, 100 kilometrojn for de Rio. Manpleno da entuziasmuloj pasigis la dimanĉon en agrabla etoso, en komforta aŭditorio de loka kulturinstanco. Okazis bonaj prelegoj kaj diskutoj pri instruado de Esperanto (Márcio Santos), instruado de

Esperanto por “tria-aĝuloj” (Alberto Flores, Guto da Gramatiko (Paulo Viana), la agado de Chuck Smith por Esperanto (Cláudio Stehling), vojaĝo al Pompejo (Alberto Flores), la tutlanda legado de gravaj verkoj en Pollando (Álvaro Motta). Oni anoncis ankaŭ aliajn Esperanto-eventojn, kiuj okazos en nia regiono en la proksimaj monatoj. La Renkonto estis organizita de lokaj Esperantistoj, kune kun Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro. Dum la tuta tago oni proponis libroservon kaj lunĉojn.

La proksima simila renkonto okazos en la urbo Lorena, ŝtato San-Paŭlo, je la 21-a kaj 22-a de aprilo 2018.



## Z-Festo en Municipa Ĉambro

Dirce Sales

En la 8-a de decembro, unu plian fojon la verda stelo de Esperanto brilas en la impona kaj historia salono de la Ĉambro de Urbokonsilantoj de Rio-de-Ĵaneiro, dank' al apogo de nia magistratano Reimont.

Kadre de la solenaĵo, okazis la liverado de la Premio Zamenhof pri Kulturo, organizita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, nuntempe gvidata de D-ro Helder Vieira Lopes. Ĝi celas omaĝi niajn veteranojn pro la granda kontribuo favore al nia lingvo kaj movado.

Ĉeestis la eventon la Ĉina konsulo Li Yang, la kurdiganto de Lingvoj en UFF Arnaldo Rosa Vieira Neto kaj multaj aliaj.

Esperantaj kanzonoj kaj poemoj estis aŭdataj el la voĉoj de Neide Barros, Dirce Sales, André Varela kaj Graça Thuler. Krome, iom da historio pri nia kara lingvo estis resume prezentita, por ke neesperantistoj ekkonu ĝin.



Supre: gravuloj en la podio dum la solenaĵo.  
Sube: kelkaj el la ĉeestantoj.





# 53-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

38-a Brazila Esperantista  
Junulara Kongreso

informoj: [www.esperanto.org.br](http://www.esperanto.org.br)

**9-a**



## TUT- AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Havano, Kubo  
11-17 februaro 2018

[www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu)

«Lingvoj kaj kulturoj:  
edukado por daŭripova  
evoluo en la Amerikoj»



# BEL-Konferencoj 2018



En la 30-a kaj 31-a de Marto  
Museu do Crédito Real  
Av. Getúlio Vargas, 455 - Centro  
Juiz de Fora - MG